

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 29-an de oktobro 2015 per Skype.

(aprobata dum la sekvanta estrar-interkonsiliĝo la 19an de novembro)

Partoprenis:

Anne Karin Bondhus en Bryne

Hilde Dahlberg en Mo i Rana

Mario Machlik en Tromsø

Ulf Lunde en Os (krom dum punkto 2)

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Kopenhago(!) (ekde punkto 4)

Douglas Draper en Oslo (dum punktoj 2 kaj 8)

0. Tagordo

Aprobata, kondiĉe ke ni povas ŝanĝi la vicordon se necese por ke Douglas povu partopreni en punkto 2.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 24-an de septembro

Aprobata.

2. Esperantonia

(Tiu ĉi punkto estis pritraktita kiam Douglas povis partopreni, do de 20.34 ĝis 21.10.)

La firmao de Cato Haugen okupas nun grandan spacon de Esperantonia kaj la buŝa interkonsento pri lupago laŭ enspezoj de librovendado ne bone funkcias, car li ne vendas librojn. Li registris sian firmaon en la adreso de Esperantonia. Ni devos lin peti, ke lia firmao forlasu la oficejon kaj li ŝanĝu la adreson de la firmao.

3. Ekonomio

La nombroj ne pretis. La kasisto sendos ilin retroŝte al la estraro poste.

4. Farendajoj post la Landa Kongreso 2015

- Brønnøysund-registrado estas farita.
- Jarraporto kaj jarkalkulo : Judith afiŝos ilin en la membro-retpaĝoj, kune kun la protokolo de la Landa Kunveno.
- Raporto de la revizoro : Pretas. La estraro plusendos ĝin al Norvega Esperantisto. La estraro petas al la kasisto proponi, kion fari pri la konto de la ne plu funkcia norvega sekcio de ILEI: tiu mono antaŭe ne estis enkalkulita en la jarkalkulo de NEL.

5. Landa Kongreso 2017

La estraro esprimas pozitivan sintenon al la alveninta propono pri la junulargastejo en Sandnes kiel ejo por la venonta Landa Kongreso. Ulf Lunde estu la ligo inter la estraro kaj la proponintoj/aranĝontoj.

6. Informado en la norvega al la publiko

- Francaj broŝuroj de AEDIS : La estraro opinias, ke la broŝuroj aspektas bele kaj ke indas traduki ilin al la norvega. Anne Karin informiĝos ĉe la franca E-

organizo. La estraro cetere diskutis, ĉu eblas emfazi la personon Zamenhof iom malpli en la paĝo pri la historio de nia lingvo.

- Vizitkartoj : Mario mendos vizitkartetojn, 250 pecojn, kaj sendos al la oficejo. Poste ni povos mendi pli, se iu deziras. Ni povos pagi tion de la propaganda konto.

7. Membroregistro

La membroregistro troviĝas nun en ununura loko : En Access 2003 en la komputilo de Anne Karin. Estas demando ĉu ni povus iel traduki ĝin al pli alirebla formato aŭ almenaŭ konservi kopio(j)n de la datumbazo ie. Anne Karin eble havos tempon esplori tion dum la kristnaskaj ferioj.

Due, foje estas utile havi la retroŝtajn adresojn de la membroj, sed antaŭ ol doni siajn adresojn al NEL ili ja devas scii, por kio ni uzos iliajn adresojn. NEL do devas iel povi kontroli, por kio oni uzos la kolektitajn adresojn, ekz-e per starigado de nova dissendolisto.

8. Mesaĝo de Ingebjørg Rambjør pri dokumentoj de Helge Knudsen

(Ankaŭ tiun ĉi punkton ni pritraktis dum la ĉeesto de Douglas en Skype, do antaŭ ol punkton 7.)

Ingebjørg havas multajn NEL-rilatajn dokumentojn postlasitajn de Helge, kiu forpasis en 2014. Tiuj dokumentoj ne povas resti ĉe ŝi por ĉiam.

La estraro fidus al Ingebjørg pritaksi la gravecon de la diversaj dokumentoj. Ŝi rajtas ankaŭ peti helpon de Ulf kaj eĉ Douglas kiam ŝi havas dubojn. Oficial-aspektajn dokumentojn kaj ĉiujn aliajn konservindajn dokumentojn ŝi sendu al arĥivejo, ekz-e al Esperantonio. NEL pagos eventualan afrankon.

9. Eventualaĵoj

Nenio.

La interkonsiliĝo daŭris 19.30 – 21.35.

La venonta interkonsiliĝo okazos la 19an de novembro.

Raportis Ulf Lunde (kaj Mario Machlik dum punkto 2)